

Resumo: Raporto por ESF 2018 “Universitato kaj Esperanto”

Komisiito: Juan Diego DÍAZ BAUTISTA, raporto@kunagade.org, jd.diazbautista@gmail.com

Kunlaboranto: Vicente MANZANO ARRONDO (Viko), viko@us.es

Dato: 28/Julio/2018

Enkonduko

Jen resumo de la longa versio de la Raporto por ESF 2018 “Universitato kaj Esperanto”¹, nur pri la sekcio “Nuna stato de Esperanto kaj Interlingvistiko en la universitato”. En la longa versio estas teksto pri nuna universitata situacio ĝenerale, teksto kun notoj pri strategio, kaj aneksaĵoj pri datumlistoj kaj demandoj.

En ĉi tiu resumo, ĉiu paragrafo havas referencon al la paĝo(j) de tiu longa dokumento por faciligi plian informadon. La vorto “universitato”, ĉi tie uzata, rilatas al supera edukado-mondo larĝasence. La datumlisto pri kursoj estas mikso inter la datumoj el Edukado.net/kursejo kaj la kolekto per Kunagade.org; disvastigado de la alvoko estis al pli ol 1300 retadresoj kaj per diversaj sociaj retoj kaj kanaloj (p. 38). Datumoj pri 7 datumlistoj elŝuteblaj kaj rigardeblaj ekrane troviĝas ĉe kunagade.org/datumlistoj kaj la datumlistoj estas (ankoraŭ oni povas kontribui):

- 1) Kursoj kaj informaj agadoj rilate al Esperanto
- 2) Revuoj, fakaj vortaroj kaj aliaj publikaĵoj
- 3) Fakaj organizoj, studentorganizoj, kaj esplorgupoj kaj retoj
- 4) Personoj (profesoroj, esploristoj, doktoriĝantoj, bibliotekistoj...)
- 5) Subvencioj kaj rilataj projektoj
- 6) Universitat-rilataj eventoj
- 7) Ideoj kaj proponoj.

Figuro 1. Mapo pri kursoj kaj studprogramoj rilataj al Esperanto nur en supera edukado.



Fonto: Propra ellaborado per Google Maps, rigardebla ĉe Kunagade.org en <http://kunagade.org/raporto-esf-2018/>

¹ Longa versio de la raporto troveblas en: <http://kunagade.org/raporto-esf-2018/>

Informoj pri instruado

KLARIGO: Por kompreni la sekvajn datumojn indas klarigi, ke kursoj estas taksataj laŭ 4 tipoj: (K1) kurso de Esperanto; (K2) Esperanto ene de studobjekto nek Interlingvistika nek Esperantologia; (K3) pri Interlingvistiko kaj/aŭ Esperantologio; (K4) kurso de Esperanto kaj pri Interlingvistiko kaj/aŭ Esperantologio. Por retaj kursoj estas la sama strukturo (RT1, RT2, RT3, RT4).


1. Kursoj enlistigitaj el la interjaro 2015-2016 ĝis Junio 2018 inkluzive estas entute 84, en 22 landoj kaj 49 urboj, specife laŭ tipo de loko: 80 kursoj de Universitato / Altlernejo; 3 de Universitatoj de la Tria Aĝo, Libertempa aŭ similaj; 1 de Universitataj aŭ studentaj asocioj / kluboj. Informo aperas disigita per dato, tipo de loko kie okazas la kurso, kaj nombro de landoj kaj urboj koncernataj (p. 12).

2. La kursoj ne ŝrumpas el unu jaro al alia, kaj estas bonaj kialoj por pensi ke estas pli da kursoj en la mondo ankoraŭ ne enskribitaj: la raporto de Germain Pirlot 2014 montras multajn landojn pri kiuj ne estas informoj por la jaroj nun esploritaj; aliflanke, sociaj retoj informas pri kursoj en diversaj landoj sed sen rektaj informoj, la trajtoj de ili restas konfuzaj kaj pro tio ne estas en la datumlisto (p. 13-14).

3. Konsiderante la mapon kaj la grafikaĵojn 2 kaj 3 (p. 12-14):


- Estas multaj landoj kie estas neniu registrita kurso ekde 2015-2016, dum en 2014 estis informoj el Bulgario, Ĉekio, Hungario, Korea Resp., Kroatio, Litovio, Meksiko kaj Madagaskaro.
- Kompare kun la Raporto Pirlot 2014, aperas novaj landoj: Irano, Kostariko, Rumanio, Rusia Federacio, Kubo, Nov-Zelando, Tajlando kaj Turkio. Antaŭe, en 2012, Pirlot registris kursojn el Rusio kaj Kostariko.
- Pri kontinentoj kaj regionoj, laŭ la komparo de Grafikaĵoj 2 kaj 3 videblas ke neniu kurso estas registrita el 2015-2016 en ampleksaj lokoj kiel Afriko, granda parto de Sudameriko (krom Brazilo), Mezoriento, Centra Azio, Suda Azio (specife Barato kaj Pakistano, krom Irano), Sud-Orienta Azio (krom Tajlando), Oceanio (specife Indonezio kaj Aŭstralio) kaj riĉaj landoj kaj regionoj kiel Skandinavio kaj Israelo. Grava rolo de Eŭropo per nombro de kursoj kaj de landoj.

Grafikaĵo 2. Nombro de landoj kun kursoj per kontinentoj laŭ la tabelo 1.



Fonto: Propra ellaborado el datumlistoj ĉe Kunagade.org kaj la Raporto 2014 de Germain Pirlot.

Grafikaĵo 3. Nombro de kursoj per kontinentoj laŭ la tabelo 1.



Fonto: Propra ellaborado el datumlistoj ĉe Kunagade.org kaj la Raporto 2014 de Germain Pirlot.

4. Pri kursostatuso (p. 16-17) dum la jaro 2018 (nur 6 monatoj) estas 17 kursoj kaj laŭ la mallongigoj de punkto 1 (ekz. K1 por kurso de Esperanto) ili estas:

- Deviga studobjekto, entute 1 kurso: 1 de K2. La sola registrita kurso kiu temas pri “Esperanto ene de studobjekto nek Interlingvistika nek Esperantologia” estas en la fako Psikologio.
- Elektebla kurso ene de la organiza studoferto, entute 7 kursoj: 3 de K1; 2 de K2; 2 de K4. Rimarkinda fakto: Esperanto havas lokon ene de diversaj fakaj studoj.
- Sendependa kurso, entute 7 kursoj: 5 de K1; 2 de RT3.
- Sen datumoj, entute 2 kursoj: 2 de K1.

5. Pri studprogramoj estas registrita unu Seminario dum 2017 en doktora programo en Kostariko kaj la Interlingvistikaj Studoj en Pollando 2017-2020. Estas novaĵo pri nova 4-jara diploma studprogramo en Ĉinio en 2018-2019 (p. 18).

6. Pri kvalifoj en universitata E-instruado estas informoj pri 66 kursoj el 84, rigardeblaj per tabeloj en la datumlisto pri kursoj ĉe kunagade.org. Specifaj kursoj por E-instruistoj estas RITE, EIT, MITE. Indus krei specifan datumliston pri ĉi tiuspecaj kursoj. Interesa informo pri EAQUALS-marko por akrediti kvalitan kurson estas raportita (p. 18).

Informoj pri esplorado

7. Personoj kontaktitaj estis pli ol 1300. Specifaj homoj kiuj rilatis/as al edukado ĉ. 350 (instruistoj, profesoroj, esploristoj, studentoj, laboristoj en eduk-administrado). Tre interesa datumbazo ankoraŭ por iĝi esplorata estas Platformo LATTES, el Brazilo: pli ol 2600 vivresumoj de diplomitoj, doktoroj (ĉ. 363), esploristoj kaj instruistoj kiuj indikas iun scipovon de Esperanto. Partnero kun universitat-rilataj E-eventoj kaj fakaj organizoj kiuj rilatas al universitato permesus kreskigi la datumliston pri personoj. Propra datumlisto ankoraŭ ne publikigita ĝis adaptiĝo al GDPR -la nova privateca EU-politiko- (p. 18-19).

8. Por esplorado kaj agadoj, subvenciebloj gravas. Datumlisto pri tio enhavas kelkajn subvencieblojn de ESF kaj Buchanan, kaj eblecojn per Erasmus+; ekzistas ebloj, i.a., per Horizon2020 kaj per ŝtataj kaj organizaj subvenciebloj sed ankoraŭ ne enskribitaj. Kelkaj projektoj estas menciitaj: du Erasmus+ KA1 pri movebleco de homoj, kiel interŝanĝoj de instruistoj; kaj tri Erasmus+ KA2: unu el ili estas *Multlingva Akcelilo* (246450 EUR) kun universitataj partneroj, aliaj du estas movadaj. Ankaŭ mencio al projekto MIME, priskribita en la sekva informero. Kelkaj E-organizoj havas sperton pri subvenciebloj, i.a.: E@I, Kosmo Strategio Ltd., kaj TEJO (p. 19-20).

9. 3 esplorgrupoj kaj 8 retoj estas menciitaj en la datumlisto pri fakaj organizoj. Esplorgrupoj kiel *Esplora grupo Filozofio, Scienco kaj Teknologioj* (Brazilo, inter 3 universitatoj kaj 3 esperantistoj kune kun ne-esperantistoj) kiu publikigas revuon kiu akceptas EO-artikolojn; *Esperanto literaturo kaj la dua mondmilito* (internacia); kaj MIME, *Movado kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo*, subvenciata eŭropa esploro (6 392 756,03 EUR) kun partopreno de Esperanto-parolantoj kaj rolo de Esperanto. Inter la retoj estas tiuj antaŭaj esplorgrupoj menciitaj, *Study Group on Language and the UN* (esperante: *Studa Grupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj*) kaj neformalaj retoj kiel: dissendolisto [universitato] en Yahoo kun 143 membroj, kaj Telegram-grupoj (p. 20).

10. La datumlisto “Revuoj, fakaj vortaroj kaj aliaj publikaĵoj” enhavas 44 enskribojn: de Bibliografio (4); Biblioteko (2, ambaŭ estas kompilo de bibliotekoj); Faka vortaro (2); Informilo (3); Revuo (faka) (11); Revuo (movada) (5); Teko (kompilon aŭ liston de diversaj temoj) (17); kaj la informanto rajtas aldoni novajn kategoriojn en la formularo. Pri bibliotekoj estas interesaj paŝoj en Usono danke al la agado de ESF kaj en UK Lisbono okazos kunveno pri bibliotekoj. Pri revuoj estas 7 fakaj revuoj kiuj akceptas artikolojn en Esperanto inter aliaj lingvoj, kaj 4 fakaj revuoj kiuj akceptas nur artikolojn en Esperanto (p. 20-22).

Aliaj informoj kaj E-agado en universitato

11. Informado kaj varbado pri Esperanto kaj Interlingvistiko gravas por plialtigi la prestiĝon de Esperanto sciigante pri la lingvo, ĝia komunumo kaj la ebloj por fakaj studoj, kaj ankaŭ gravas por varbi universitatojn kaj universitatanojn. Pri tio, en la datumlisto pri kursoj estas unu enskribo pri informagadoj kaj ĝiaj efikoj laŭ la sperto en Jagelona Universitato (Krakovo, PL) kadre de la agadoj de la *Scienca E-rondo*, kaj unu enskribo pri agado Francio por agnoski la E-diplomon B2 kaj C1 en ŝtata konkurso por instruistoj (p. 22).

12. Agnosko kaj enkonduko de Esperanto en ŝtata eduka sistemo estas ŝatata de 90% (80 el 89 homoj) el la respondintoj al la demando “Ĉu vi ŝatus ke Esperanto estu enkondukata en edukado sistemo de via Ŝtato?” Ĉi tiu agnosko estas grava temo por komuna pensado pri E-agado en universitatoj. Krom la sperto en Francio, estis sukcesa E-diploma agnosko por mezlerneja laborkonkurso en Galegio, Hispanio (p. 22).

13. La datumlisto “Universitat-rilataj eventoj” enhavas ĝis nun: Ateliero (1); Festivalo (1); Konferenco (3); Kongreso (1); Kunveno (3); Prelegoj (1); Premio (1); Sesio (1); Simpozio (4). Inter ili: *Premio Pirlot* disdonata denove dum 2018; *Novjorka Simpozio* dum 2018 pri “Multlingvismo en Internaciaj Organizaĵoj kaj Internacia Kunlaboro”, ĉ. 100 partoprenantoj; eventoj dum UK kiel *Internacia Kongresa Universitato (IKU)* kaj *Esperantologia Konferenco* kaj *Kunveno pri Bibliotekoj*; konferencoj kiel *Konferencoj de ILEI* kaj *Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST)*; prelegoj kiel *Buchanan-prelego* en la Universitato de Liverpool (Britio); aŭ simpozioj kiel *Interlingvistika Simpozio* en Poznano (Pollando) kaj, tuj post UK, *Nitobe-Simpozio* en 2018 kun la temo “instruado kaj esplorado pri Esperanto en (soci/inter) lingvistiko kaj en sociaj sciencoj” (p. 23).

14. Interŝanĝoj de spertoj pri E-agado en universitatoj gravas por ne inventi la radon kiam ni deziras agadi en universitato. Tiel, estis informo pri interŝanĝo de spertoj kaj kunlaborado inter universitatoj de Amsterdamo kaj Parmo kadre de Erasmus+. Denove estas menciita la E-agado pri Sciencaj E-rondoj kun pliaj informoj pri ĝia utileco por la rilato inter Universitato kaj Esperanto. Indas pripensi ĉu interesas nin kolekti informojn pri E-agadoj spertoj, faciligi interŝanĝojn de ili kaj repliki kaj adapti modelojn (p. 23-24).

15. Estas enskribitaj tri studentorganizoj: el Hispanio, el Ĉinio kaj el Brazilo. Kune kun la Scienca Esperanto-rondo povas esti unu el la bonaj vojoj por E-agado en universitatoj (p. 24).

Rilato inter la universitata E-mondo kaj la ne-universitata E-mondo

16. Pri la informero “Universitataj E-agadoj kaj E-organizoj” atentigi, ke la esploro farita por verki ĉi tiun raporton evidentiĝis la fortaj kunligoj inter la universitata E-agado kaj la ne-universitata E-mondo. E-organizoj movadaj kaj fakaj, studentorganizoj, muzeoj, bibliotekoj, individuaj esperantistoj ktp, ne malofte estas malantaŭ la progreso de E-agadoj en universitatoj. Kvankam estas komuna celo enkonduki Esperanton en supera edukado kaj en fakoj, informoj, spertoj kaj rimedoj malfacile fluas kaj troveblas (p. 25).

17. Antaŭa aserto postulas pripensi la bezonatan kunlaboradon inter ne-universitata E-movado kaj universitata E-movado. En la longa versio estas diversaj ekzemploj pri kunlaborado inter ambaŭ mondoj kaj komunaj defioj kiel, ekz., manko de homfortoj; kelkaj rilatoj: subteno de ESF kaj E-organizoj al studentoj por la oficiala postdiplomo *Interlingvistikaj Studoj*; subteno de la *Amsterdamo Katedro* danke al la E-movado; oficiala aldono de Esperanto en la listo de kursoj de la *Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED)* pro la agado de Hispana Esperanto-Federacio; la universitata agado de TEJO per siaj tri komisionoj kaj interesgrupoj (*Universitato, Scienca kaj Faka Agado, kaj Edukado*) kaj la informo de unu el la komisiitoj pri sia haltigita *Trenta projekto* por starigi universitatan asocion kun Eŭropa aliro kaj kreado de sekcioj en aliaj landoj; ekzisto de la komisiono pri *Universitata Agado* de ILEI; la agado de Edukado.net sub la gvido de Katalin Kovats pri la KER-diplomoj; aŭ la agadoj kaj defioj de ISAE, AIS kaj TEC pri, ekz., homfortoj.

Same povas esti dirite pri universitat-rilataj eventoj, monhelpoj al esploristoj aŭ kursoj de Esperanto en universitata nivelo, danke al la subteno kaj kunlaborado de la E-movado; kaj, same, la E-movado ankaŭ bezonas la laboron de E-universitatoj kaj E-fakuloj.

Interesa situacio estas la alvoko de IKEF pri la starigo de la nova 4-jara diploma studprogramo en Ĉinio kie Esperanto havas gravan rolon. Resumo de tiu alvoko: se ne estas merkatika bezono de estontaj E-diplomitoj, la studprogramo povas malaperi; por ke tio ne okazu, kunlaborado estas bezonata por utiligi Esperanton profesie. Paŝoj en universitata E-agado postulas paŝojn en E-movado, kaj inverse. Indus pripensi kiusence la vojkruciĝon en la E-movado rilatas al ĝia pragmata aliro en agadoj (p. 25-27).